# Esperanto en Danio

22-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2015



**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Peter Wraae
Filippo Botta

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.02.2016**

# Enhavo

**Zamenhof tago – tago de la libro.........................................3**
**Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj…4**

**Programo de KEK...................6**
**Pri la kulturnokto en Kopenhago...............................7**
**Festado en Kopenhago okaze de la UN-tago............................8**
**Partopreno en foiro..................9**

**Membrostatitisko de UEA......10**
**Rigardu ekster Eŭropon!.......11**


**Gajnis la nomo "Esperanto". 12**
**BET–52....................................12**
**BITOTEKO..............................15**

**La centunua...........................16**
**Dana eĥo el Ostendo............17**

**Nova kurso ĉe Duolingo........18**
**Jarfinaj renkontiĝoj en Germanio...............................18**

**La unua prezidanto de UEA. .21**
**Lingva diskriminacio kondamnita............................23**

# Zamenhof tago – tago de la libro



Al niaj membroj estas certe konate ke la 15-an de decembro oni festas la naskiĝtagon de L.L. Zamenhof, sed tiu tago estas ankaŭ la tago de la Esperanta libro. Estis la fama verkisto Julio Baghy kiu proponis antaŭ multaj jaroj ke la Zamenhof-tago estu ankaŭ la tago de la Esperanta libro. Nia literaturo originala kaj tradukita estas ege abunda kaj nia movado disvastigas kulturverkojn de diversaj etnoj, ebligante al ĝui la verkojn de aliaj popoloj.

Ankaŭ nia biblioteko estas ege abunda kaj enhavoriĉa, sed ni havas pli da libroj ol la modesta spaco de nia oficejo permesas. Tial ni decidis fordoni librojn dum la Zamenhof-festo, kiun ni festos dimanĉe la 13-a de decembro en la Kulturdomo. La ĉeestantoj havos la eblecon elekti kaj ricevi tuj la librojn, sed se niaj aliaj membroj tra la lando deziras kelkajn librojn pagante la ekspedokostojn, ili estas ege bonvenaj kontakti nin rete kaj mendi kiom da libroj oni deziras ĉe: dea@esperanto.dk.

Ni planas nuntempe la organizadon de nia venonta jarkunveno la lastan semajnfinon de aprilo 2016, kaj intencas okazigi ĝin en Fueno, por ke estu pli facile partopreni ankaŭ por niaj jutlandaj membroj. La vicprezidanto de UEA Stefan Mcgill estos nia gasto kaj preleganto.

*Ileana Schrøder*

# Jubileo de Unuiĝintaj Nacioj

Ĉi-jare oni festas la fondon de UN kiu okazis antaŭ 70 jaroj, kaj la 10-an de decembro la tagon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Precipe pri la fondo de UN ni memoru la politikan testamenton de Zamenhof *Post la granda milito: alvoko al la Diplomatoj,* pere kiu li en 1917 admonis kaj konsilis al la diplomatoj: "Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj eŭropaj regnoj ni havus iam proporcie kaj geografie aranĝitajn 'Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo!'". Temis tiam pri Eŭropo, kaj li ne imagis ke la venonta milito estos ne nur Eŭropa sed monda kaj multe pli terura. Nur post tiu milito oni sukcesis unuigi la naciojn, kaj jen ni denove memoru la historion pri tiu evento:

En aprilo 1945 kunvenis en San Francisko delegitoj de 50 nacioj por la fonda kunveno de Unuiĝintaj Nacioj. La milito furiozis ankoraŭ en Japanio, sed la 3 Grandaj Nacioj (Britio, Usono kaj Sovetunio) invitis ĉiujn landojn, kiuj ĝis la 1-a de marto 1945 deklaris militon al Germanio kaj Japanio. La aliancanoj principe agnoskis la bezonon de internacia organizo por preventi estontajn agresojn, certigi stabilecon de la landlimoj kaj provizi volon solvi konfliktojn inter la nacioj. La plej vigla subtenanto de tiu ideo estis la prezidento de Usono Franklin Roosevelt. Li estis konvinkita ke la malsukceso de la antaŭa Ligo de Nacioj grandparte estis merito de la prezidento Wilson, kiu ne sukcesis konvinki la Usonan Senaton konfirmi la traktaton.

Por ke la sama sorto ne repetiĝu, Roosevelt komencis jam dum la milito prepari la popolon menciante siajn esperojn por nova monda organizo. Li certis ke la nacioj lernos kunlabori se ili fakte spertos labori kune. En sia parolado Kristnaske 1943 li emfazis ke la ĉefa celo de tiu organizo estos konservi la pacon. Li diris interalie: "La doktrino ke la fortaj dominas la malfortajn estas doktrino de niaj malamikoj – kaj ni rifuzas ĝin". En januaro 1945 Roosevelt malkovris al la Kongreso sian esperon anstataŭigi la malnovan sistemon de "ekskluzivaj aliancoj kaj influ-sferoj" per universala organizo en kiu ĉiuj pacemaj nacioj fine havos ŝancon aliĝi.

En la propono de la Ĉarto pri Unuiĝintaj Nacioj, la homaj rajtoj laŭ la sugesto de Usono estis menciitaj sed tamen ne estis klare definitaj, kaj la Ĉarto protektis la suverenecon de la landoj, malpermesante al UN interveni okaze de malobeo. La sola escepto estis interveno de la Konsilio de Sekureco se oni konstatas, ke la internacia paco kaj sekureco estas minacataj. Oni finredaktis la Ĉarton kaj ĝi estis subskribita la 26-an de junio 1945.

Dum tiu unua konferenco pluraj neregistaraj organizoj forte rekomendis establi komisionon pri lingvaj rajtoj, ĉar en la Ĉarto de UN la homaj rajtoj ne estis klare difinitaj. Oni aprobis la establon de la komisiono, kiu komencis sian laboron en januaro 1947. Kiel estro de la komisiono oni unuanime elektis Eleanor Roosevelt, la edzinon de la mortinta Usona prezidento. Post 83 kunsidoj kun viglaj kaj pasiaj diskutoj, oni finfine malfrue vespere la 10-an de decembro 1948 estis preta voĉdoni: 48 nacioj por, 8 sindetenoj, kaj neniu kontraŭ. La ĉeestantoj konsciis ke ili partoprenas signifan historian eventon kaj regis solena kaj emocia atmosfero. Mi varme rekomendas legi la libron de la Usona ambasadorino ĉe Vatikano Mary Ann Glendon: *A world made new,* pri la diskutoj de la komisiono dum la laboro.

*Ileana Schrøder*

# Programo de KEK

"Konversacia Esperanto-Klubo" kunvenas en la "Kulturdomo" Tomsgårdsvej 35, lunde je la 12.00 aŭ la 19.00 horo.

9-an de novembro je la 19a horo en ĉambro C. **Teo kaj Amo**

Bent Jensenius gvidos.

Ni spektas kelkajn el la 45 mallongaj filmoj de la ĉina konkurso ĉi-jare. Filmetoj el Brazilo, Ĉinio, Koreio, Irano, Kongo, Argentino, Italio, Slovakio ktp. Vi mem prijuĝu ĉu la ĝustaj gajnis!

16-an de novembro je la 19a horo en ĉambro C. **Resuma filmo pri la Grundtvig-projekto**

"Kultura diverseco kaj multlingvismo de Eŭropo - kiel lerni pri ili?". Partneroj estis: Centro de Interkultura Edukado - Nowy Sącz, Polland, Edukado.net - Nederlando; Interkultura Centro Herzberg, Germanio kaj Kultura Esperanto-Asocio - Hungario.

20-an de novembro je la 19 horo en ĉambro C. **Babila vespero.**

Venu por babili pri ĉio kaj nenio.

30-an de novembro je la 19 horo en ĉambro C. **Plurpersonaj prelegetoj.**

Bent Jensenius gvidos. Diversaj personoj prezentas diversajn temojn dum 10 aŭ 20 minutoj. Ĉiuj estas bonvenaj ĉu KUN, ĉu SEN temo. Komputilo kaj projekciilo estos disponeblaj. Espereble estos kelkaj surprizoj.

7-an de decembro **je la 12-a horo**.. **Studgrupo**.

Betty Chatterjee gvidos. Ni daŭre legos la membiografion de Carl Nielsen. Ni legos la paĝojn 101 - 118.

**Dimanĉe** la 13-an decembro. **Zamenhoffesto.**

Rezervu la tagon!

La festo okazos de la 14a ĝis la 17a horo en la Kulturdomo en Tomsgårdsvej 35 (enirejo: Birkedommervej 43). Tie la gastojn atendos kafo/teo kaj kukoj. Betty Chatterjee legos kristnaskan fabelon, kiun ŝi mem verkis. Muzike distros nin niaj junaj membroj Mikaelo, Victoria kaj Jonas, kaj ni komune kantos kristnaskajn kantojn. Pliaj informoj estos videblaj en la kalendaro de nia hejmpaĝo: www.esperanto.dk.

# Pri la kulturnokto en Kopenhago




Dum la kulturnokto, la 9-an de oktobro ekde la 18-a ĝis la 23-a horo, estis Esperanto-ekspozicio en taŭga loko en la kafejo de Verdenskulturcentret, Nørre Allé 7 en Kopenhago.

Betty pere de Skype parolis kun homoj el la tuta mondo, laŭ horaro – unuope. Sur granda ekrano ni povis sekvi la spektaĵon.

Ne multaj homoj vizitis nin. Peter Weide suplementis la ekspozicion per *Esperanto-nøglen, kort grammatisk oversigt og ordliste* plus *ESPERANTO lille grammatik for dansktalende.*

Oni ankaŭ disdonis *Et vindue til verden*, broŝuron de DEA.

Kim muzikis dum la paŭzo.

Bent servis la lokon kunlabore kun Finn kaj Filippo.

Peter Vraae suplementis al Betty. Vizitis nin s-ro Dalmose el Næstved, Ina, Kamma kaj Bent Muus.

*[laŭ raporto de Jytte Sunekær]*

# Festado en Kopenhago okaze de la UN-tago

Ĉar DEA estas membro de KUKS (Komiteen for Udlandsforeningers Kulturelle Samvirke) oni invitis nin partopreni la festadon de la 70-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj, la 24-an de oktobro en la halo de la urbo-domo de Kopenhago. Dek el niaj membroj partoprenis la solenan vesperon, ĝuante la kulturan programon kaj la bongustan manĝaĵon de la 29 budoj starigitaj de diversaj nacioj de la mondo. Jen sube junuloj de la rusa danca kaj kanta grupo *Karusel* kaj Nepalaj naciaj dancoj.





# Partopreno en foiro

Ankaŭ ĉi-jare ni partoprenis la Vojaĝfoiron (Rejsemessen), kiu okazis inter la 16-a kaj 18-a de oktobro en Øksnehallen, Vesterbro. Ni konstatis ke nia najbara budo havis multe pli da interesitoj ol ni. Temis pri budo de asocio *De berejstes hus* ("la domo de la multvojaĝintoj") sed ni ĉiam tamen kaptas la okazon esti videblaj. La laboro tamen ne estis vana: du personoj aliĝis al nia estonta kurso.



# Membrostatitisko de UEA

La 1-an de septembro 2015 la nombro de individuaj membroj atingis 5382. Tio estas precize 600 pli ol la 1-an de septembro antaŭ unu jaro, kiam la nombro estis 4782. Evidente la granda UK estas la ĉefa kaŭzo de la 12,5-procenta kresko. La 100-a UK en Lillo altiris 2698 aliĝintojn, dum pasintjare en Bonaero la nombro estis 706.

Laŭkategorie la nombroj estis (interkrampe komparo kun 1 septembro 2014): Membro kun Gvidlibro 349 (-48), juna MG 36 (-1), Membro kun Jarlibro 1975 (+756), juna MJ 279 (+46), Membro-Abonanto 1732 (-112), juna MA 60 (-13), Dumviva Membro 739 (-33), juna DM 13 (-1), DM kun Jarlibro 135 (+8), juna DMJ 15 (sama), Honora Membro 43 (-2), Honora Patrono 6 (sama).

1324 ne estis membroj pasintjare. El ili 892 aliĝis al la UK kaj 432 ne. La proporcio de virinoj inter la novaj membroj estas 50%, tiu de viroj 47%. En la tuta membraro 62% estas viroj kaj 35% virinoj. Pasintjare 30% estis virinoj, sed Lillo efike kreskigis ilian proporcion ĉi-jare. Eble okazos ioma falo en 2016, sed la tendenco estas, ke virinoj okupas kreskantan parton de la membraro. Notindas, ke el la dumvivaj membroj nur 28% estas virinoj. Tio respegulas la ĝeneralan bildon en la pasinteco, ĉar plejparte dumvivaj membroj kotizis antaŭ longe.

Fine, 890 pasintjaraj membroj ĝis nun ne remembriĝis ĉi-jare. El ili 71 estas aliĝintoj de la UK en Bonaero. Interesa estas ankaŭ la distribuo de la ne-realiĝintoj laŭ la kategorioj: MG 113, MG-T 33, MJ 337, MJ-T 149, MA 227, MA-T 31.

*Osmo Buller*

# Rigardu ekster Eŭropon!

Kiam danoj demandas kiel fartas aŭ progresas Esperanto, estas ruze respondi direktante ilin ekster Eŭropon. Konfirmo de tio videblas en kompara statistiko pri la UK en Lillo en 2015 kaj la antaŭa en Francio (Montpeliero) en 1998.

En la tiama kongresa libro aperis laŭlanda statistiko pri 2852 el la 3133 kongresanoj, do ĉ. 6% pli ol la 2698 en Lillo.

El la plej multaj **eŭropaj** landoj aliĝis malpli da homoj en 2015 ol en 1998. Samnombraj estis la francoj kaj la belgoj. Kelkaj tamen kreskis – ne laste Danio! Sed krom Japanio, ĉiuj ekstereŭropaj landoj kreskis sufiĉe forte.

*[laŭ Douglas Draper en Norvega Esperantisto]*

| lando | 1998 | 2015 |
|---|---|---|
| Pollando | 167 | 115 |
| Britio | 76 | 59 |
| Hispanio | 100 | 56 |
| Italio | 145 | 89 |
| Rusio | 181 | 51 |
| Svislando | 53 | 50 |
| Ĉeĥio | 67 | 49 |
| Finnlando | 55 | 41 |
| Litovio | 57 | 38 |
| Svedio | 53 | 38 |
| Estonio | 26 | 6 |
| Bulgario | 20 | 18 |
| Kroatio | 20 | 10 |
| Nederlando | 87 | 79 |
| Japanio | 250 | 171 |

| lando | 1998 | 2015 |
|---|---|---|
| Francio | 724 | 724 |
| Belgio | 95 | 95 |
| Germanio | 177 | 200 |
| Slovakio | 19 | 26 |
| Ukrainio | 9 | 20 |
| Hungario | 25 | 48 |
| Danio | 24 | 43 |
| Norvegio | 17 | 22 |
| Brazilo | 68 | 124 |
| Ĉinio | 30 | 95 |
| Koreio | 18 | 57 |
| Usono | 40 | 48 |
| Irano | 9 | 28 |
| Kanado | 5 | 26 |
| Meksiko | 0 | 26 |

# Gajnis la nomo “Esperanto”




La pola ŝtata fervoj-entrepreno akceptis la trajno-nomon ESPERANTO por linio inter Varsovio kaj Bjalistoko. En la fino de la voĉdonado la nomo Esperanto havis 3940 voĉojn, la nomo Narew 2509 voĉojn, Bojary 200 voĉojn.

La interurba rapidtrajno “IC Esperanto” funkcios ekde decembro, kaj denove aŭdeblos la nomo Esperanto en polaj stacidomoj. – Pli frue jam funkciis trajno kun la sama nomo inter Bjalistoko kaj Varsovio, sed ĝi estis nuligita en junio 2013, ĉar uzis ĝin nesufiĉe multaj pasaĝeroj.

La polaj esperantistoj kore dankas al ĉiuj voĉdonintoj en la tuta mondo! Via voĉdono multe helpis en la diskonigo de Esperanto en la pola ekstermovada medio. Sen via helpo la sukceso ne estus atingita!

*[Ret-Info]*

# BET–52

***Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni tradiciajn la 52-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-52). La aranĝo okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).***

***Inter la aliĝintoj estas pluraj bone konataj esperantistoj, kiuj kontribuos al la instrua, kleriga kaj kultura programoj de BET-52. Inter ili estas la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo BULLER, por kiu BET-52 estos la unua internacia esperantista aranĝo, kiun li partoprenos post la fino de sia kariero en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo.***

**DATO:** La 2-10-an de Julio, 2016. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

**LOKO:** BET-52 okazos en la urbo BIRŠTONAS, kiu situas 40 kilometrojn for de Kaunas kaj 90 kilometrojn for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius, apud la ĉefa rivero de Litovio Nemunas. Ĝi situas en la centro de la regiona nacia naturparko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. BIRŠTONAS estas antikva kaj fama kuraca banloko de Litovio, fondita en 1382. La urbo estas ideala loko por laboro kaj ripozo, ĝi estas facile atingebla buse kaj aŭtomobile. Eblos uzi multegajn (pli ol 50) diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn kaj servojn, naĝejon, saŭnon, sportan salonon k.a. BET-52 havas subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo. La ĉefa lokalo de BET-52 estas bonege ekipita sanatorio *Versmė*. En BIRŠTONAS jam okazis BET-40 en 2004.

**PARTOPRENO:** ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj.

**ANTAŬ KAJ POST BET-52** estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi, plibonigi sian sanon, uzi multegajn sanigajn kaj kuracajn procedurojn kaj servojn, kuraci sin en unu el tri tre altnivelaj kaj modernaj sanatorioj

kaj kuracejoj de BIRŠTONAS *Versmė*, *Tulpės* kaj *Eglė* aŭ en urbaj hoteloj, gastejoj, turismejoj kaj ripozejoj.

**ALIĜKOTIZO:**

a) 25 eŭroj por esperantistoj el Estonio, Latvio, Litovio.

b) 35 eŭroj por esperantistoj el ekssovetiaj landoj.

c) 45 eŭroj por esperantistoj el ekssocialismaj eŭropaj landoj.

d) 55 eŭroj por okcidentanoj kaj egaluloj.

**Infanoj, lernantoj kaj studentoj aliĝkotizon ne pagas. Pageblas en ajna konvertebla valuto.**

**ALIĜO:** eblas aliĝi rete www.esperanto.lt/aligxilo_BET.html. Pri aliaj aliĝ-eblecoj legu en la retejo de la aranĝo.

**PREZOJ** de loĝado, manĝado, pageblecoj kaj aliaj financaj kaj aliaj kondiĉoj estas troveblaj en retejo de la aranĝo.

**GRAVE:** Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo por la loĝado (krom hoteloj) aŭ manĝado laŭelekte ne pagos.

**PROGRAMO:** tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

**ALIAJ GRAVAĴOJ:** Aktualajn informojn pri BET-52 Vi povas trovi en retejo de BET-52 www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52 . Tie Vi trovos plenan kaj detalan Informilon pri BET-52. Krome, informoj pri

BET-52 estas konstante publikigataj en novaĵretejo *La Balta Ondo* (www.sezonoj.ru), novaĵretejo *Barelo* (www.barelo.blogspot.com) kaj en la revuo *La Ondo de Esperanto*.

**KONTAKTADRESO:** p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas +370-687-12219 ; +370-686-69875. Telefakso estas: +370-37-228616. Retadresoj de LEA estas: litova.ea@mail.lt ; irenaa@takas.lt ; pjegorovas@takas.lt . Retejo de BET-52 estas www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52 .

**BONVENON AL LITOVIO !**

# BITOTEKO

Ankoraŭ nemultaj scias, ke Hispana Esperanto-Federacio funkciigas interretan bibliotekon "Bitoteko" – kolektejon de elektronikaj versioj de multaj kaj interesaj Esperantaj literaturaj materialoj!

La biblioteko havas plurajn subfakojn (literaturo, tradukoj, infanlibroj, ktp.) kaj estas signifa ne nur en hispania, sed ankaŭ en internacia nivelo.

Mian intereson aparte vekis la kolekto "Gazetoteko", kiu enhavas 124 legeblajn kaj elŝuteblajn Esperanto-gazetojn, inter ili tiajn interesaĵojn kiel *"La praktiko", "Bulteno de ATEO" (ateistoj), Esperanta Numismatiko, "Familia Esperanto"* kaj multaj aliaj.

La plej freŝa kolekto en Bitoteko estas la *Kongresaj Kurieroj,* t.e. la ĉiutagaj informiloj, eldonitaj dum la Universalaj Kongresoj. En la kolekto troviĝas **ĉiuj kuireroj de ĉiuj UK-j** ekde 1908 ĝis 2015 – ĉiuj ili estas legeblaj kaj elŝuteblaj en formato pdf!

Sinceran gratulon al Roland Rotsaert, la Fondaĵo Vanbiervliet kaj la zorg-antoj de Bitoteko pro tiu sindona laboro kaj kunlaboro!

Adreso de Bitoteko: http://bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/

*[Ret-Info]*

# La centunua




***Se vi ĉi-jare ĉeestis kaj ŝatis la centan Universalan Kongreson en Lillo, vi jam nun pripensu aliĝi al la sekva UK – la centunua en la slovaka urbo Nitra. (Kaj ankaŭ se vi ne ĉeestis!).***

La unuajn aliĝojn por Nitra oni akceptis jam en Lillo, kaj notu ke la kotizoj plialtiĝos ekde la 1-a de januaro! Cetere la  aliĝkotizoj restas samaj kiel jam por la tri antaŭaj UK-oj: 180 € por membroj de UEA, 225 € por ne-membroj, 90 € por junuloj. Plej facile oni povas aliĝi per la reta aliĝilo ĉe http://www.uea.org/kongresoj/alighilo.

Multaj esperantistoj jam konas la urbon Nitra, ĉar plurfoje la fama *Somera Esperanto-Studado* okazis tie. La temo de la venontjara UK estos *Socia justeco – lingva justeco*.

# Dana eĥo el Ostendo

Mi iĝis membro de AEDE (Association Européenne Des Enseignants / Eŭropa Asocio de Instruistoj) kaj tie atenteme informis pri uzo de Esperanto dum lernejaj aktivaĵoj kadre de la eŭropa projekto Erasmus +.

Verŝajne vi jam scias, ke en la ILEI-Konferenco en Oostende partoprenis 4 danoj kun subvencio de tiu eŭropa programo. Sekve de tia informado la estraro de la belga AEDE-EL-sekcio petis, ke mi verku artikolon pri E-o por la bulteno de la sekcio. Je la komenco de 2015 ĝi estis publikigita; eblas legi ĝin ĉe:

http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-2015-03.pdf (p. 4-12).

La 17-an de julio mi mallonge informis la belgan sekcion pri la malfermo de la ILEI-konferenco en Ostendo kaj, jam la saman tagon, la ĉefredaktisto petis, ke mi verku mallongan raporton por la venonta bulteno.

Pluras ja diversaj manieroj por kunlabori kun ne-esperantistaj medioj samfakaj, ni nur provu uzi tiujn eblojn. Sed, por ekrilati kun tiaj medioj, ekzemple kun AEDE, nepras:

- iĝi AEDE-ano (pli facilas informi „de interne” ol „de ekstere”);
- esti profesie instruisto;
- informi laŭokaze, kiam temas pri instruado kaj Eŭropo kun uzado de Esperanto. Mencii faktojn. Paroli racie.

Neniam la celo estu altrudi Esperanton; okaze de demandoj, ne tro longe respondi kaj mencii interesajn retpaĝarojn, ekzemple esperanto.net kaj lernu.net.

*Germain Pirlot*

# Nova kurso ĉe Duolingo



Ĵus komenciĝis ĉe Duolingo la preparado de "Esperanto for Spanish speakers" (por hispanparolantoj): https://incubator.duolingo.com, en *Incubation Phase 1.* La preparado de la versio por anglalingvanoj daŭris proks. dek monatojn – supozeble ĉi-foje pretiĝos pli rapide.

Intertempe estas registritaj 165.000 Esperanto-lernantoj en la angla lingvo ĉe duolingo.com; proks. 1100 novaj lernantoj tage. Vidu ĉe *Incubation Phase 2.*

**Listo de pliaj retaj Esperanto-kursoj ĉe:**

**http://tinyurl.com/lingvoleriloj**

Tie troveblas ankaŭ retaj vortaroj, aŭtomataj tradukiloj, lingvoludoj, kartaroj por vortolernado, perado de instruistoj kaj konversaciaj partneroj ktp.

Konstateblas, ke 90 % de la retaj senkostaj lingvopaĝoj kun almenaŭ 25 lingvoj havas nun ofertojn ankaŭ en Esperanto. Kial? Nu, eble tiu ĉi prelego helpos klarigi la kaŭzon:

http://www.esperantoland.org/dosieroj/LaLongaVosto.pdf

*Lu Wunsch-Rolshoven [ret-info]*

# Jarfinaj renkontiĝoj en Germanio

Ĵus la kalendaro memorigas nin, ke la somero bedaŭrinde finiĝas. Baldaŭ estos vintro – ankaŭ tute bona sezono por kunveni en Esperantujo :)

La 14-a Novjara Renkontiĝo (NR) okazos en Saarbrücken, tuj apud Francio. Taŭga regiono por internacia kunveno, ĉu ne? Ekzemple trajnoj el Parizo bezonas eĉ ne du horojn...

### Por familioj kaj “nefamilioj”

Multaj el vi jam aliĝis kaj antaŭĝojas denove kunveni en internacia rondo. Aliĝis ankaŭ jam trideko da infanoj kaj junuloj, fine kutime estas sesdeko – jes, NR kaj NIS estas tre taŭgaj por familioj, estas multaj program-ofertoj por infanoj, tiel ke la gepatroj povas iom senzorge ĝui la kun-estadon kun samaĝuloj.

Sed certe NR ne estas nur por familioj. Bonvenas ĉiu sendepende de la aĝo kaj fakte kutime trideko da partoprenantoj estas “nefamilioj” – unuopuloj kaj paroj sen (ĉeestantaj) infanoj.

### 7-a Novjara Internacia Semajno (NIS) por junuloj

Dum la pasintaj jaroj Novjara Internacia Semajno (NIS) establiĝis kiel kunveno por junuloj ĉe la okcidenta rando de Germanio, ĝis nun ĉefe inter proks. 12 kaj 20 jaroj. Pro la longa distanco al la ĉi-jara JES kelkaj pli aĝaj junuloj jam anoncis sian partoprenemon...

Formiĝis en NIS internacia grupo de dudeko da junuloj, kiuj vivas sian propran ritmon laŭ siaj deziroj. NIS estas ideala kunveno, kiam gepatroj kaj junulaj infanoj volas komune ferii, sed tamen havi sian apartan pro-gramon. Sed kompreneble kelkaj pli aĝaj junuloj afable permesas al siaj gepatroj ferii aliloke...

### Skolta ekskurso

Ĉi-jarfine la Verdaj Skoltoj planas dutagan ekskurson dum la semaj-no. Estos orientiĝa marŝ-ado kun serĉado, mem-kuirado, tranoktado en iu dometo... Certe Valère Doumont sperte kaj bele aranĝos tion.



*Karina, Ĵomart kaj Nataŝa*

**Koncertoj dum NR**

Dum la 14-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Saarbrücken (kun la 7-a NIS por junuloj) estos du koncertoj:

Ĵomart kaj Nataŝa estas de pli ol du jardekoj konata duopo en Esperantujo; ili koncertis ankaŭ jam en NR. Eble ĉi-foje ilia filino Karina kune prezentiĝos.



*Bertilo kaj Birke*

Birke kaj Bertilo kune ekkoncertis antaŭ kelkaj jaroj - per fluto, gitaro kaj kantado. Ili prezentis siajn kantojn ekzemple en Arkones kaj en SES en Slovakio.

Ekzemploj de koncertoj de ambaŭ grupoj troveblas en YouTube.

Do, se vi volas ĝui tiujn koncertojn kaj plurajn dekojn da aliaj prezentoj, prelegoj, amuzaj aŭ instruaj vesperoj, promenoj, babilado en amika rondo... tiam venu festi kun ni en Saarbrücken ĉi-jarfine.

**Prelegoj, laborgrupoj, promenoj...**

Kiel kutime estos proks. okdeko da diversaj ofertoj dum la semajno - prelegoj pri plej diversaj temoj, laboraj kaj diskutaj rondoj, promenoj por iom senstreĉiĝi ekster la domo...

Kaj kompreneble estos kafejo por libere babili kun malnovaj amikoj kaj novaj konatoj.

**Lingvo-kursoj**

... okazos, kiel ĉiam, en diversaj niveloj, por komencantoj, progresantoj, konversacia rondo.

Veraj lingvokursoj por infanoj kaj junuloj supozeble ankaŭ ĉi-jare ne estos – la sperto montras, ke la geknaboj dum la ferioj preferas ferii al ĉio lernej-simila... Ili lingve spertiĝas dum la diversaj programeroj.

Ĉu vi eble ŝatus partopreni en NR kaj NIS?

Nu, eble ĵetu rigardon al la Facebook-paĝo
https://www.facebook.com/events/701061096672344

Eble iom legu ĉe: http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr

Aŭ iom informiĝu ĉe jamaj kaj plurjaraj aliĝintoj pri NR; jen la listo
ĉi-jara: http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr14.php
kaj pasintjara: http://www.esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr13.php
– ambaŭ kun aĝostatistiko.

Kaj por tuj aliĝi:

http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo

Estu bonvena dum venonta NR kun NIS!

Ĝuu Esperantujon

# La unua prezidanto de UEA

La unua prezidanto de UEA,fondita en 1908, estis la anglo *Harold Bolingbroke Mudie.* Li naskiĝis la 30-an de junio 1880 apud London kaj mortis antaŭ nun precize cent jaroj: la 6-an de januaro 1916 en Forges-les-Eaux, Francio, pro aŭto-akcidento.

En sia civila vivo Mudie estis borsisto. Li esperantistiĝis en 1902, leginte pri Esperanto en *The Review of Reviews*. Laŭ Adresaro Serio XXIII (1903) li estis esperantisto 7491 kaj listiĝis kun adreso en Kensington.

En novembro 1903 Mudie fondis la gazeton *The Esperantist,* laŭ financa garantio de William Thomas Stead. La gazeto tamen liveris ne perdon, sed profiton. Kiam *The Esperantist* kunfandiĝis kun *The British Esperantist* en januaro 1906, li aliĝis al ties redakta komitato. Li multe laboris por la eldono de la Nova testamento en Esperanto.

Mudie estis en la organiza teamo "Trio por la Tria" de la 3-a Universala Kongreso (UK) en Kembriĝo (1907). Li fariĝis unue vicprezidanto, poste (de 1912 ĝis 1916) prezidanto de Brita Esperanto-Asocio. En 1908 li fariĝis prezidanto de la nove fondita Universala Esperanto-Asocio (UEA). Eduard Stettler nomis lin “naskita prezidanto” pro liaj retorikaj kapabloj.



*Karikatura bildkarto (el ĉ. 1912)*

Jam en 1905 li estis nomumita de Zamenhof membro de la unua (ĝis 1906 ankoraŭ provizora) Lingva Komitato. Li faris multajn alilandajn inform-vojaĝojn kaj vizitis ok Universalajn Kongresojn.

Post la komenciĝo de la Unua mondmilito en 1914, Mudie aliĝis la armeon kaj faris rapidan karieron. En januaro 1916 kapitano Mudie mortis pro aŭtomobila akcidento en Francio. Nur en 1919 oni elektis novan UEA-prezidanton, nome la antaŭan vicprezidanton Hector Hodler.

*[el Vikipedio]*

# Lingva diskriminacio kondamnita

La 24-an de septembro 2015 la kortumo de la Eŭropa Unio verdiktis ke la Eŭropa Komisiono ne rajtas submeti konkurs-anoncojn kaj ekzamenojn nur en tri lingvoj (EN, FR, DE). Ĉi tiu verdikto havas grandan gravecon por ni esperantistoj.

La Kortumo rekonas la samajn rajtoj al ĉiuj la 24 oficialaj lingvo de Eŭropa Unio. Kaj se ĉi tiu jurisprudenco daŭrus, tiu havus grandajn implikiĝojn, ĉar en longa tempo, EU povos rekoni ke verkado de ĉiuj dokumentoj en 24 lingvoj en mallonga tempo estas granda malŝparo da mono, da tempo, kaj ĉefe da kvalito.

Ĉu EEU emas labori pri ĉi tio? Mi proponas.

*Walter Bruno*




*Por trovi la tekston de la verdikto, iru al http://curia.europa.eu/, elektu vian preferatan lingvon kaj serĉu la akton numero T-124/13.*



*La danaj kunvojaĝintoj al Lillo antaŭ la buso*